Sankta Spirito, Vin

DISCENDI, AMOR SANTO

COME DOWN, O LOVE DIVINE



2. Senhalte brulu ĝi, / ĝis ĉiu terpasi'
fandiĝos en la fajro konsumanta,
kaj kiam pli kaj pli / la vojo antaŭ mi
heliĝos en la lumo radianta.

3. Puriĝu mia mens' / de ĉiu peka pens',
plenigu min sincera humileco;
ke mi kun vera sent' / de plej profunda pent'
lamentu pri la propra ne-indeco.

4. Neniam iru for! / Restu en mia kor',
ke ĝi, al Via gloro sopirante
estu, per Via grac', / ejo de sankta pac',
en kiu enloĝadas Vi konstante.

DISCENDI, AMOR SANTO • COME DOWN, O LOVE DIVINE • HAM 235, HON 90, LBW 508 • Unisono 42 • M (Down Ampney): Ralph Vaughan Williams 1906 • itala T: Bianco da Siena 15. jc. • angla T: Richard Frederick Littledale 1867 • E: M. C. Butler, 1966 en HE 94